nia voĉo

madrida esperanto-liceo julio/aŭgusto 2022

## VIZITOJ EN MADRIDO

Dum tiuj ĉi someraj monatoj ni denove spertas la vizitojn de esperantistaj ekstermadridaj amikoj en nian regionon. Kun kelkaj el ili ni planas renkontiĝi dum la unuasabata rendevuo, denove en la polpejo en la strato Esperanto, aŭ en la lunda renkonto. Ni evidente ne povas certigi ĉies planojn, sed laŭ la mesaĝoj ricevitaj, jen kelkaj informoj:

La 27an de junio vizitis la sidejon Sandra Burgues, esperantisto el Montevideo (Urugvajo), kiu troviĝas en Madrid pro medicinista kongreso. Ŝi probable denove renkontiĝos kun esperantistoj ĉu en la polpejo, ĉu aliloke.

Fine de junio alvenis Hispanion mezlerneja studanto, Madeleine, el Usono. Post vizito al Eŭskio, ŝi revenos al Madrido la 9an kaj 10an de julio, kie ŝi volonte renkontiĝos kun junuloj kaj vizitos la sidejon.

Ankaŭ komence de julio troviĝos en Madrido Orlando Raola, kubdevena usonloĝanta esperantisto, estrarano de UEA. Li ne povis ĉeesti la pasintan renkonton (malgraŭ nia anonco), sed probable venos ĉifoje.

Laszlo Polgar, la patro kaj trejnisto de la tri mond-ĉampionoj pri ŝako, Zsuzsa (Susan), Zsófia (Sofia) kaj Judit, restos en Madrido de la 2a ĝis la 6 de julio kaj enketas pri malnovaj libroj pri ŝako. Ne certas ke li povos renkontiĝi kun esperantistoj, sed jen alia ebleco.

Memoru: la unuasabata rendevuo en la polpejo okazos la 2an de julio je la 18,30 horo, kaj la adreso estas: Pulpería O Miño, str. Esperanto, 2 (metrostacio Alsacia, lineo 2). Kaj la renkontoloko de la lundoj troviĝas en strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º-7 (metrostacio San Bernardo, lineoj 2 kaj 4)

Se vi konas vizitojn de aliaj esperantistoj, kiuj havas intereson renkonti la madridajn samideanojn, skribu al Liceo, madrid@esperanto.es, kaj ni provos disvastigi la informon. Ni ankaŭ sugestas ke vi vizitu la kutimajn retajn forumojn (vidu je la fino) por tion disvastigi, kaj ankaŭ se vi estas interesitaj koni la alvenantajn planojn.

## ANKAŬ EN FUENLABRADO

Por vizitantoj ankaŭ estas interese scii ke Fuenlabrada Esperanto-Ligo decidis aliĝi al Pasporta Servo, proponante sian sidejon por tranoktado, atinginte la konsenton de la direktorino de la CEPA. Tiu sidejo troviĝas en Fuenlabrado, tute proksime de metro- kaj trajn-stacio, do kun facileco viziti la ĉefurbon aŭ aliajn urbojn de la regiono.

Krome, FEL planas feston en julio, okaze de la fino de sia kurso. Okazos rostokrado en la sidejo. Dato estas ankoraŭ fiksota do atentu la informejojn por koni la detalojn.

## INTERNACIAJ KONGRESOJ

Multaj internaciaj renkontiĝoj estas atendataj dum tiuj ĉi someraj monataj. Vi povas sekvi la diversajn eblecojn en la retejo https://eventaservo.org/.

La Universala Kongreso de Esperanto, organizata de Universala Esperanto-Asocio, okazos ĉijare en Montrealo (Kanado) inter la 6a kaj la 13a de aŭgusto. La temo estos "Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj". Informoj pri programo, aliĝoj, alveneblecoj kaj multe pli aperas en: https://esperanto2022.ca/.

Ankaŭ en Kanado, konkrete en Kebekurbo, okazos la Kongreso de instruistoj de Esperanto, inter la 30a de julio kaj la 6a de aŭgusto, pri la temo "Esperanto en dulingva aŭ plurlingva edukado".

La Internacian Junularan Kongreson oni celebros en Nederlando, inter la 20a kaj la 27a de aŭgusto. Ĉiuj informoj estas alireblaj ĉe: https://ijk2022.tejo.org/.

Por tiuj kiuj ne povos vojaĝi, vi povos partopreni la kongreson de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kiu okazos rete, ĉar laŭplane ĝi devis okazi en Moskvo, sed ĝi estis nuligita pro la militaj cirkonstancoj. La datoj estos inter la 29a de julio ĝis la 1a de aŭgusto, kaj vi povas informiĝi en: https://www.satesperanto.org/.

## TAGO DE ESPERANTO

Ni memorigas ke la 26an de julio oni denove festas la Tagon de Esperanto, okaze de la datreveno de la eldono de la Unua Libro, en 1887.

Ni aldonas la afiŝon pretigitan de UEA por festi tiun tagon, kaj kuraĝigas vin ĉiujn memorigi kaj disvastigi laŭ viaj ebloj kaj ŝatoj.




## PLIAJ RETAJ FILMOJ

Hispana Esperanto-Federacio plu publikigas videojn de la Kongreso de Comillas en sia jutuba kanalo https://www.youtube.com/user/esesperanto, specife en la kanalo alirebla per la adreso: https://www.youtube.com/playlist?list=PLX5Zs1YSAzT4n_9inuBP10_RzzVqhl10E.

La partopreno de Jorge Camacho en la legoklubo de Fuenlabrada Esperanto-Ligo estas spektebla jam ĉe: https://www.youtube.com/watch?v=MfO_vFEque4.

La prezento de Miguel Fernández en Granado, sub la titolo *"Laikismo, internaciismo kaj poezio"* ankaŭ videblas rete en la adreso: https://www.youtube.com/watch?v=ICcvy5Dy_Wc.

## POR PLIAJ INFORMOJ

La sidejo plu malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie, sed sen aparta programo.

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

NI DEZIRAS AL ĈIUJ LEGANTOJ PLEJ FELIĈAN SOMERAN SEZONON!

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro, 13, 3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com